

# La Progreso

REDACTIE-  
COMITE  
G. P. DE BRUIN  
G. J. DEGENKAMP  
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL  
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 331133

W. F. KRUIT  
H. KUYT  
JAC. LEM JR.  
J. VAN SCHEEPEN  
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## PROBLEMOJ EN LA UZADO DE L'ARTIKOLO

(Fino)

Ĉar la uzado de la artikolo ne estas ligita al logika neceso, ĝi multe dependas de naciaj kutimoj. Se en iu lingvo oni iukaze ne uzas artikolon, oni ne tuj sentas ĝian mankon samkaze en Esperanto. Kiel ekzemplojn ni prenu la nederlandajn esprimojn „bovenstaande, onderstaande, meergenoemde, bijgaande, ondergetekende, bijgesloten, ingesloten, nevengaande, aanstaande, volgende, vorige, verleden, komende” k.s., kutime uzatajn sen artikolo, kaj kiujn oni sekve de tio ofte uzas sen artikolo ankaŭ en Esperanto, kvankam la artikolo ankaŭ tie ĉi povas pli precize difini la aferon: *atentu enmetitan* (een ingesloten) komunikon; *atentu la enmetitan* (de ingesloten) komunikon.

Eĉ en aferon, en kiu tuj evidentas, ke la artikolo ne taŭgas, ĝia uzo tamen enŝoviĝis pro naciaj kutimoj. Ni celas la proprajn nomojn. Propra nomo ne bezonas artikolon. En la naciaj lingvoj tamen ekzistas esceptoj. Nederlande ni ekzemple uzas ĝin ĉe kelkaj nomoj de landoj kaj regionoj: Veluwe, Betuwe, Saargebied, Provence, Vendée, Boekowina, Ukraïne, Levant, Sahara, Minahassa k.s. Estus sencece imiti tion en Esperanto.

La kutimo uzi artikolon ĉe rivernomoj estas ne nur nederlanda: de Rijn, de Wolga. Tiu senbaza kutimo tamen ne regu en Esperanto, kie ĝi estus escepto nemotivebla. Same ĉe aliaj propraj nomoj, ekz. de montoj, domoj, ŝipoj, organizoj la artikolo ne havas sencnon kaj estas pura naciaĵo.

Se la propran nomon antaŭas komuna nomo (*la rivero Rejno, la urbo Leiden*), la artikolo estas korekte uzata. Tian ekzemplon oni klarigu: la difinita urbo,

kiu portas la nomon Leiden. Sed laŭ tiu regulo la artikolo estas motivebla ankaŭ en la jenaj ekzemploj: *la sinjoro Jansen, la doktoro Pietersen*. Jam dekomence oni tamen ne uzis la artikolon ĉe tiuj nomindikoj, kaj ne ekzistas motivo por nun ŝanĝi tion. Sed rimarku, ke oni kutime skribas *la familio Z*.

Superflua estas la artikolo antaŭ nomoj de sanktuloj: *Sankta Petro* (de H. Petrus). Ankaŭ ĉe postmetitaj adjektivoj de propraj nomoj (*Karlo Granda*) oni ne uzu ĝin, kvankam ofte oni ĝin uzas tiuloke, precipe antaŭ ordaj numeraloj (*Karlo (la) 5a*).

Nur en certaj komparoj la artikolo havas utilon: *Hitler estis la Nerono de l' moderna epoko*. Ĉi tie la propra nomo verdire fariĝis nomo komuna, kaj sen artikolo tia komparo iel lamus.

La nomoj „patro, patrino, avo” k.s. estas ofte uzataj kiel propraj nomoj; same la vortoj „onklo, kuzo” k.s., se temas pri difinita persono. En tiu kazo ili kompreneble ne bezonas la artikolon, sed anstataŭe oni skribu ilin kun majusklo: „Patro” k.t.p. Cetere, ĉe la nomoj de parencoj la distingo inter propra kaj specia nomoj ne estas facile difinebla. Oni do agu laŭcirkonstance.

Kvankam la karesaj nomoj „panjo, paĉjo, onĉo, avinjo” k.s. certe ne ĉiam postulas komencan majusklon, tamen ŝajnas al ni, ke la artikolo antaŭ tiuj nomoj estas praktike superflua.

Interese estas, ke la nomoj „pastoor, dominee, dokter” estas ankaŭ sen artikolo uzataj en certaj rondoj, en kiuj tiuj personoj trovas iom intiman aŭ konvencian akcepton. Tio signifas, ke praktike tiuj nomoj fariĝis tie propraj nomoj. En Esperanto tio ŝajnas al ni nerekomendinda.

## TRA NIA LITERATURO

**LETEROJ EL MIA MUELEJO** de Alphonse Daudet, tradukis el la franca lingvo Mijake-Siĥej, eldono de Japana Esperanto-Instituto, Tokio, Tongo-Motomati 1—13, (Japanio) 1949. Formato: 11 x 15 cm. 80 paĝoj. Prezo: 0.40 US-dolaro.

Jen la unua kajero de Internacia Biblioteko de J.E.I. La verketo konsistas el sepo da ĉarmaj, eble iom naivaj, rakontoj el la verkaro de la fama franca novelisto. Certe kun plezuro novaj esperantistoj legos ĉi tiujn simplajn verkaĵojn. La verkinto estas delikatsenta homo; li scias krei kortuŝajn situaciojn. Jen estas junulo, kiu frenezigiĝis post seniluziigo pri amatino; jen estas kaprino, kiu tutan nokton defendis sin kontraŭ lupo por kornbatoj, antaŭ kiam la sovaĝa besto ĝin manĝis. Sed jam sufiĉe pri la enhavo; la lingvo nun pli interesas nin.

La tradukinto ne havis facilan taskon; li ja estas japano. Kiel li mencias en la enkonduko, li prefere tradukas el la japana lingvo, sed lia celo estas, doni al novaj japanaj esperantistoj specimenojn de eksterlanda literaturo. En Japanio mankas la rimedoj por aĉeti eksterlandajn eldonaĵojn.

Tamen, li sukcesis prezenti lernigan lingvon, tre taŭgan por komencantoj en literaturstudado, precipe pro la facile rekoneblaj rimarkindaĵoj. La simpla stilo plene akordiĝas kun la delikataĵoj. Kiom trafe diversaj naciaj esprimoj kreiĝis Esperante, ekz.: pĝ. 12 ... *eluzi la reston de sia vervo* (z'n laatste greintje hartstocht verbruiken) pĝ. 19 ... *ensorĉita de sia metio* (geheel in z'n vak opgaand) pĝ. 22 ... *ne estas eble eĉ por ekpensi* (daar is zelfs geen denken aan) pĝ. 29 ... *malgrasan vizaĝon, kiu krias de malsato* (blaffen of scheel zien van de honger) pĝ. 29 ... *fen kien kondukis vin la pasio al la belaj rimoj* (zie je nu, waar je met je hartstocht voor mooie rijmen terecht bent gekomen) pĝ. 30 *Je kia ajn kosto* (tegen iedere prijs) pĝ. 53 ... *hieraaŭ,*

*ĉirkaŭ la trapo de tagmezo* (gisteren op slag van twaalf) pĝ. 58 *Ve, mi certigas vin, ke li estas forte mordita* (... dat hij het zwaar te pakken heeft) pĝ. 60 *Maksimoj, proverboj aŭ sentencioj, per kiuj niaj kamparanoj plektas siajn parolojn* (Spreuken en spreekwoorden waarmee onze boeren hun gesprekken doorspekken) pĝ. 60 *fajfilulodonto, kiu havas la provencan legendaron sur sia fingropinto* (een fluitspeler, die de Provençaalse legendes op z'n duimpje kent) p. 69 *Ĉi tiu kanalo T. ludis al ĝi tute malnoblajn aferojn* (dat kanalie van een T. haalde gemene streken met d'r uit) pĝ. 77 *Tiu bela vizaĝo kurigis admiran murmuron* (dat mooie gezicht deed een bewonderend gemompel rondgaan).

Gramatike la traduko estas korekta, tamen la tradukinto prezentas kelkajn formojn, kiujn oni ĝenerale konsideras eraraj, ekz.: la uzo de infinitivo post la prepozicio „sen“ pĝ. 31 *ĝi lasis sin melki senmove, sen meti sian piedon en la pelveiton (nemetante)* pĝ. 47. *Ni restis sidantaj unu apud la alia sen paroli (neparolante)*; la uzo de kelkaj netransitivaj verboj kiel transitivaj, pĝ. 9 ... *nur tiam ili konsentas iri (eniri) sian hundejon*. pĝ. 21 *homo, kiu iras (en) la straton*, pĝ. 53 ... *oni kredus la lokon neologata (neenlogata)*; la uzo de „kiel“ kie estas parolo pri speco, pĝ. 13 *Ne estas du kiel (tiaj, kia) ŝi*, pĝ. 13 ... *se li havus edzinon kiel (kia) ŝi*.

Eraroj estas: pĝ. 10 ... *argentaĵo ringoj al (en, sur) la oreloj*. pĝ. 10 *Mi prenis la poŝtveturilon, sufiĉe malnova(n) omnibuso(n)*. pĝ. 19 *unu muelejo daŭris turniĝi kuraĝe (la alioj de unu-muelejo daŭrigis la turniĝon kuraĝe)*. Pleonasmo estas: pĝ. 30 *Ili ŝajnis esti sendependaj kaprinoj sufiĉas: ŝajnis*. Kelkaj nekutimaj interjekcioj estas interesaj: *frrrr! Hp! hu! Hej! prrrr! Uŭ! Uŭ!* Kvino da preseraroj ne tre ĝenas.

Resume, ni povas rekomendi la legadon de ĉi tiu libreto; ĝi estas lerniga, precipe por komencantoj.

H. Kuijt.

Antaŭ nura adverbo (zij zingt het moeist) la artikolo ne estas uzebla. Kelkaj tiaj ekzemploj (*la plej bele*) el la unuaj jaroj de Esperanto estas nekorektaj. Preskaŭ substantivan signifon havas la artikolo en „la vera, la bona“ k.s. (het ware, het goede), pro kio kelkaj gramatikistoj proponis skribi „lo vera, lo

bona“ k.t.p. por eviti konfuzon kun „la vero, la bono“ (de waarheid, het goed). El ĉio en tiu ĉi artikolo dirita, oni klare komprenas, ke absolutajn regulojn pri la uzado de la artikolo oni ne sukcesas doni. Ĝia uzado multe dependas de nacilingvaj influoj kaj personaj konceptoj.

## POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

### WEDERKERENDE WERKWOORDEN.

2.

Bij taalstudie spreekt men van de eerste, tweede en derde persoon. Hier bedoelt men niet slechts mensen mee, maar ook wel dieren of dingen.

1e PERSOON enkelvoud, is de spreker; hij noemt zich IK, in Esp. MI; spreekt iemand ook namens anderen, dan is dat meervoud, hij gebruikt dan WIJ, in Esp. NI.

2e PERSOON enkelvoud, is de toespreker; men zegt dan U, JIJ, JE of GIJ, in Esp. VI; spreekt men tot meer dan één persoon, dan heeft men met meervoud te doen en zegt dan U, GIJ, JULLIE of JELUI in Esp. VI.

3e PERSOON enkelvoud, is iemand of iets, waarover men spreekt; men zegt dan HIJ, ZIJ, HET, MEN of de naam, in Esp. LI, ŜI, ĜI, ONI of de naam; spreekt men over meer dan één persoon, dier of ding, dan is dat meervoud; men zegt dan ZIJ, in Esp. ILI, of de namen.

Het wederkerend pers. voorn.woord SI. Men leze aandachtig de volgende voorbeelden: *Mi instruas min. Ni savis nin. Vi kombas vin.* Zoals men leerde is MI eerste persoon enkelv., NI eerste persoon meerv. en VI tweede persoon enkel- of meerv.

Indien er nu sprake is van derde persoon enkel- of meervoud, moet men goed opletten, want in de zinnen: *Li razas lin. Ŝi kombas ŝin. Ĝi defendas ĝin.* en *Johano vestas lin.* is onderwerp en lijdend voorwerp niet dezelfde persoon. Met de voorwerpen *lin, ŝin* en *ĝin* wordt dus iemand anders bedoeld dan met het onderwerp: Hij scheert *hem*. Zij kamt *haar*. Het verdedigt *het*. Jan kleedt *hem*. Is er sprake van een onderwerp in de derde persoon, dat een handeling toepast op zichzelf, dan gebruikt men in Esperanto een speciaal voornaamwoord, n.l. SI.

*Li venĝas sin* — Hij wreekt *zich*. *Ŝi distras sin* — Zij ontspant *zich*. *Ĝi ŝirmas sin* — Het beschermt *zich*. *Ili banas sin* — Zij baden *zich*. *Oni instruas sin* — Men onderwijst *zich*. *Johano lavas sin* — Jan wast *zich*.

In deze voorbeelden is onderwerp en lijd. voorwerp dus dezelfde persoon. SI dient om aan te duiden, dat de han-

deling wederkeert op het onderwerp, het kan dus zelf nooit onderwerp zijn.

(Wordt vervolgd.)

Ter vertaling. Opgave 7.

Het meisje kan zich nog niet kleden, daarom kleedt haar moeder haar. Met z'n vieren verdedigen zij zich. Een aantal boeken is erg beschadigd. Jan heeft twee pakken, het beste draagt hij zelden. Twee aan twee marcheerden zij het bos in. Vader zei, dat hij zich al geschoren had. Hij noemt zich een bekwaam esperantist. Ik verzoek U beleefd, mij niet te storen. Om zes uur worden de winkels gesloten. Twintig maal twintig is vierhonderd. Driehonderdvijftig gedeeld door tien is vijf en dertig. De jongen kwam behoorlijk gewassen in de kamer terug. Ga nooit weg zonder gegroet te hebben. Het concert in het park begon precies om acht uur. Als je vroeger begonnen was, zou je nu reeds klaar zijn. De mens bestaat uit vlees, bloed en beenderen. Er bestaan geen mensen, die Esperanto niet kunnen leren. Moeder braadt het vlees; wat ruikt het heerlijk!

Vertaling van opgave 5.

Ĉi tiuj pentraĵoj estas eksterordinare 1) belaj 2). Ĝiaj estas la desegnaĵoj? Johano ne povas tiel bele skribi kiel 3) lia 4) frato. Bedaŭrinde, li ne plu 5) estas membro de nia sekcio. Ĉi tiu libro kostas ne pli 6) ol du guldenojn 7). Ni diligente studas por la A-diplomo. Pli kaj pli oni praktike uzas 8) Esperanton. En la kunveno oni makakceptis 9) ĉi tiun proponon. La plimulto 10) estis kontraŭ ĝi. Kiel 11) oni tradukas ĉi tiun frazon 12)? Ĝia estas ĉi tiu traduko? Miaj kursanoj studas eksterordinare diligente 13). Oni legu 14) ofte laŭte, por ke oni lernu 14) paroli bone.

1) Ook: *admiringe, treege*. Niet aanbevelenswaardig is: *malofte*, ter voorkoming van misverstand, zie: *Ĉi tiuj pentraĵoj malofte estas belaj*. 2) Niet: *bele*; *belaj* noemt een eigenschap van *pentraĵoj*. 3) Niet: *ol*; na *tiel* volgt *kiel*; *ol* volgt gewoonlijk na *pli*. 4) Niet: *sia*; hier is iets verzwegen, de betekenis van de zin is: *J. povas ne tiel bele skribi kiel lia frato (povas skribi); lia frato* is hier onderwerp van de tweede zin en in een onderwerp mag „*sia*” niet voorkomen. 5) Niet: *pli*; *pli* heeft betrekking op hoeveelheid of graad, bijv.: *Vi posedas pli da libroj ol mi*. 6) Niet: *plu*; hier is

## LA HOMA KORPO

B. Rijpstra.

I.

La Naturo konsistas el:  
*minerala* regno: karbo, salo, petrolo, metaloj k.t.p.;

*planta* regno: la vegetaĵoj;

*animala* regno: bestoj kaj homo.

Plantoj kaj bestoj *vivas*: ili spiras, nutras sin, kreskas, generas, sentas impresojn, mortas.

Plantoj spiras: tra la poroj de la folioj eniras aero (azoto, oksigeno, karbonacido); por la spiro servas la oksigeno.

Plantoj nutras sin per mineraloj en likva (solvia) aŭ gaseca stato.

El la aero ili prenas karbonacidon (kombinaĵon de karbono kaj oksigeno); la oksigeno liberiĝas, la karbono kombiniĝas en la folioj kun akvo; tiel estiĝas amelaĵo. Tio povas okazi nur per klorofilo (verda substanco en la ĉeloj) sub influo de lumo. Tamen, ne ĉiuj plantoj nutras sin tiel, ekz. fungoj kaj parazitaj pantoj nutras sin aliel kaj ne havas klorofilon. El la tero la radikoj suĉas azoton, fosforon, sulfuron. Hemia sterko provizas la teron per tiuj ŝtofoj (fekundiĝi la teron).

Bestoj nutras sin per plantoj aŭ bestoj; diĝestaj sukaj likvigas la nutraĵon en spicialaj organoj.

La sentumoj (perceptoranoj) de la bestoj alte superas tiujn de la plantoj.

La strukturo de la homa korpo tre similas tiun de la besta korpo.

Ĉiu korpo, ĉu planta, ĉu besta, ĉu homa, konsistas el *ĉeloj*.

Amelaĵo = zetmeel.

animalo = dier, dierlijk wezen.

azoto = stikstof.

ĉelo = cel (anatomia ero, kiu konsistigas planton kaj beston; ĝin formas: membrano = celwand, protoplasmo = levende celstof, kerno.

diĝesto = spijsvertering (igas la nutraĵon asimilebla = opneembaar, solvante ĝin per sukaj = sappen).

fekunda = vruchtbaar.

generi = voortplanten (naskigi).

hemia sterko = kunstmest

karbono = koolstof.

karbonacido = koolzuur (kombino de karbono kaj oksigeno).

klorofilo = chlorophyl, bladgroen, kleurstof.

likva = vloeibaar.

oksigeno — zuurstof (senkolora gaso, ne povanta bruli, sed nepre necesa por brulado (diĝesto) kaj spirado; kun hidrogeno = waterstof ĝi formas akvon; ĉiu kombinaĵo de oksigeno kun alia elemento estas oksido).

poro = porie, opening (ĉiu el la preskaŭ nepercepteblaj aperturoj = openingen de la haŭto, tra kiuj eliras la ŝvito).

sentumo = zintuig.

strukturo = structuur, bouw.

sulfuro = zwavel.

Dem.: Kiel mi traduku la jenan frazon? Hij die weet, en weet dat hij weet, is een meester.

Resp.: Tiu, kiu scias, kaj scias ke li scias, estas majstro.

sprake van een hoeveelheid. Zie ook de vorige zin. 7) Niet zonder N; altijd eerst ontleden; gezegde: *kostas*, onderwerp: *ĉi tiu libro*, bepaling zonder voorzetsel: *du guldenojn*. „Pli” en „ol” zijn geen voorzetsels. 8) Niet: *okupas*; wel kan: „...okupas sin pri Esperanto. 9) Niet: *forjetis*; *proponon oni akceptas aŭ malakceptas. Malpurajon oni forjetas*. 10) Niet: *plejmulto*; hier is sprake van twee groepen, voorstellers en tegenstellers; bij vergelijking tussen twee zelfstandigheden gebruikt men „pli”. Zie: „La Pr.” No. 3, Maart '49. 11) Niet: *kia*: dit moet een bijwoord zijn, het hoort immers bij een werkwoord. Zie „La Pr.” No. 5. 12) Niet: *propozicion*; voorbeeld: *La patro estas kontenta, ĉar lia filo sukcesis*. Dit is een zin (frazo); deze zin bestaat echter uit

een hoofdzin (ĉefa propozicio) en een bijzin (dependa propozicio); dus: één frazo, maar twee propozicioj. 13) Niet: *diligentaj*; *diligente* heeft betrekking op een werkwoord, moet dus een bijwoord zijn. Zie nog eens „La Pr.” No. 5. 14) Niet: *legus*; deze zin heeft niets te maken met een voorwaardelijke wijs, maar wel met de gebiedende wijs; er wordt immers iets verlangd.

Beoordeling: E. A. B. te A. 9, G. B. te Z. 8, D. K. te Z. 8, G. A. te R. 9, Moor 8, Astor 9, J. G. D. te Z. 7, A. A. D. te Z. 7, G. B. N. te Z. 7, H. J. H. te B. 9, P. W. V. te Z. 6, A. J. G. te D. 10, J. J. B. te D. 10, Lupo 10, G. v. O. te A. 7, E. J. B. te G. 7, P. W. W. te G. 8, C. v. S. te R. 9, C. v. B. te S. 8.

## DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem

Hij zit in de knoei.

Wat ik te zeggen heb, mag je gerust horen.

Wat baat het, of....?

Hij lachte als een boer, die kiespijn heeft.

Wat heeft dan nu te maken met....?

Het ene gat met het andere stoppen.

Gaat dan maar vast.

Allesbehalve.

Het is nu eenmaal de gewoonte.

Beteugel je drift.

Lafbek.

Een vos verliest wel zijn haren, maar niet zijn streken.

Zich opwinden.

Gedane zaken nemen geen keer.

Waarop moet dat uitlopen?

Onbekookte uitvallen.

Te gelegener tijd.

Li enŝuldiĝis.

Kion mi diras, vi povas libere aŭskulti.

-Kiom utilos, se....?

Li ridis, kvazaŭ li ekmordus ion acidan.

Kian rilaton tio do havas al (kun)....?

Rabi Petron por pagi Paŭlon.

Vi iru jam.

Tute ne.

Jam tia estas la kutimo.

Bridu vian koleron.

Malbravaĉulo.

Lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn.

Vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokinojn manĝas.

Ekscitiĝi.

Kio fariĝis, jam ne refariĝos. Kio pasis, ne revenos. Kontraŭ ago farita, ne helpas medito.

Kiel tio finiĝos?

Senpripensaj paroleksplodoj.

En tempo pli oportuna.

### Opgave 7.

1. Toen ik die lafbek zijn gedrag verweet, begon hij te lachen; maar het was duidelijk.... hij lacht als een boer, die kiespijn heeft. 2. Jongens, als jullie klaar zijn, gaat dan maar vast; ik kom (vertaal: volg) dadelijk. 3. Wind je niet zo op, beteugel je drift; met kalme woorden zul je meer bereiken dan met onbekookte uitvallen. Wat baat het, of wij daar lang over spreken? Gedane zaken nemen geen keer. 5. Hij weet geen orde op zijn zaken te stellen. Hij zit verschrikkelijk in de knoei en tracht het ene gat met het andere te stoppen. Waarop moet dat uitlopen? 6. Ik waarschuw je, wees voorzichtig. Zijn verleden (vertaal: vroegere gedrag) was allesbehalve smetloos en je weet: een vos verliest wel zijn haren, maar niet zijn streken. 7. Je hoeft niet weg te gaan (vertaal: Het is niet nodig, dat je weggaat); wat ik te zeggen heb, mag je gerust horen. 8. Te gelegener tijd zal ik je (weleens) vertellen wat wij van plan waren. 9. Het is nu eenmaal de gewoonte iemand, ter gelegenheid van een jubileum, een geschenk aan te bieden. 10. Wat heeft dat nu te maken met het onderwerp van ons gesprek?

### Vertaling van opgave 6

1. Mi bone konis vian patron; li estis homo en plej pura senco. 2. Mi ne povis ekdormi. Malrapide la horoj treniĝis. Ĉiaj pensoj moviĝis en mia kapo. Kiam la horloĝo sonis la kvinan (horon), mi

elliĝis, vestis min kaj iris eksteren por enspiri iom da freŝa aero. 3. Mi ne eraris; montriĝis, ke li estas nefidinda (nekonfidinda) persono. Jam de la unua rigardo li ne plaĉis al mi. 4. Ni kalkulas kiel nian devon averti vin pri troa (troiĝita) optimismo. 5. Kiam oni ne volis cedi al li, li senceremonie per la kubutoj (perkubute) rompis al (por) si vojon tra la amaso. 6. Oni inklinus diri, ke ili estas fratoj; ili similas unu al la alia kiel de l' sama akvo gut' al guto. 7. Vi agus prudente, se vi ĉion honeste konfesus; ne serĉu pretekstojn. Vi ne sukcesus nebuligi al mi la okulojn. 8. Lia inventaĵo (eltrovajo) laŭtigis post mallonga tempo lian nomon per multbuŝa famo. 9. Kion vi scias pri tio? Iom pli modesta, amiko mia; vi ĵus estas dekreĉita de patrino ĵupo. 10. Ĉu mi povas kuraĝi peti al vi diri al mi (ke vi diru al mi), kun kiu mi havas la plezuron paroli?

### Beoordeling:

H. J. Jr. en B. 9; C. v. S. en R. 6; P. M. W. en Gr. 7; E. A. B. en A. 9; G. B. N. en Z. 6; Lupo 8; G. A. en R. 7; G. B. en Z. 6; D. K. en Z. 8; A. J. G. en D. 7; Astor 8; Klopodanto 7; D. W. en Gr. 7; C. W. v. A. en Gr. 9; Moor 8.

Al la abonantoj, kiuj bonvole cedis al ni ekz. de la febr. kaj marta n-oj de '49a nian koran dankon! Pluaj ekz. estas ankoraŭ bonvenaj. Krome ni bezonas kelke da ekz. de la febr. n-o de '48a. Kiu helpos?

Administracio.

## POR PROGRESANTOJ

J. VAN SCHEEPEN

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 7. Vertaal in Esperanto:

Met genoeg las ik in ons Esperantoblad, dat door Uw gemeentebestuur een nieuwe reisgids wordt uitgegeven, geheel in het Esperanto gedrukt. Dat U op deze wijze de prachtige stad met omgeving ontsluit, niet alleen voor Uw landgenoten-esperantisten, doch ook voor hen, die buiten de landsgrenzen wonen, stemt ons met vreugde en het gebruik van één enkele taal kan voor U alleen maar voordelen bieden.

Wij juichen het dan ook toe, dat U er toe bent overgegaan de internationale taal Esperanto voor Uw reclame te bezigen. Het geeft blijk van een duidelijk inzicht in de moeilijkheden, die het gebruik van een nationale taal voor dergelijke doeleinden met zich meebrengt. Wij willen gaarne Uw streven in onze kringen bekend maken en voor dit doel verzoeken wij U ons een exemplaar van de nieuwe uitgave te willen doen toekomen, waarvoor wij U bij voorbaat hartelijk danken.

Vertaling van opgave 5.

LA PATRINOTAGO. 1)

La patrinotago konkeris 2) vastan lokon en la koroj de la popolo. Kelkiu 3) — supoze pesimisto 4) — skribas 5), ke la patrinotago estas spirita produkt(a)jo de la negoca 6) mondo, kiu iniciatis 7) ĉi tiun tagon por per ĝi profite negoci 8). Al kio la patrinotago dankas sian 9) originon 10), ne estas precize 11) konate 12) al mi (\*), sed se eĉ estus tiel, ke iun ajn komerciston 13) kaptis la eminenta 14) ideo pri patrinotago, mi tamen 15) devus 16) ankoraŭ konfesi kun multaj leter(o)skribintoj, ke (ĝi) estas belega ideo. La nakiĝa reventago de la 17) patrino estas per si mem tago, en kiu oni havas la okazon 18) esti amsenta kaj danka 19) pro tio, kion 20) signifas la patrino por ĉiu. Tago, kiu koncernas ĉiujn patrininojn de la tuta mondo, ja metas specialan stampon sur ĉi tiun esprimon de amo kaj danko. Cetere, ĉu ekzistas sufiĉe da tagoj, en kiuj oni esprimas al la patrino la honoron, kiun ŝi meritas 31).

(Het Vrije Volk)

\*) Van k-do Lafeber te Gouda ontvingen we de volgende interessante aantekeningen: Sinjorino Ann Jarvis el

Usono treege fervoris por la enkonduko de „Patrino Tago” post la morto de sia patrino, kiu mortis la 12an de majo 1905a Tial la dua dimanĉo de majo estas la „Patrino Tago”.

1) Dit kan zowel met als zonder lidwoord. Ook: (por)patrina tago. 2) Ook: prenis. Niet okupis. Dan zou hij deze plaats nu niet meer hebben. 3. Ook: kelkaj personoj, unuopulo(j). 4) Ook: nigrepensulo, kritikemulo. Niet: nigra rigardanto. 5) Ook: asertas, opinias. 6) Niet: afero. Ook: komerca, komercistaro. 7) Ook: fondis, kreis, enkondukis. 8) Ook: fari bonajn negocojn. 9. „Zijn oorsprong” heeft betrekking op het onderwerp „moederdag”, dus: sia. 10) Ook: devenon, fonton. 11. Ook: ekzakte. 12) „Ne estas konate” is een onpersoonlijke uitdrukking, eindigt dus op „e”. 13) Ook: negociston. 14) Ook: elstaranta. Niet: ilustra = geïllustreerd. 15) De zin begint met „se”. „Dan” vertalen we dus niet met „tiam”. 16) Vele inzenders vertaalden „devas”. De voorwaardelijke wijs is hier echter op zijn plaats: Se estus tiel, mi devus.... 17) Is het nog nodig te zeggen, dat in het Esperanto het lidwoord vereist is? 18) Ook: estas en la okazo. 19) „Erkentelijk” betekent ook: dankbaar. „Erkentelijk” en „dankbaar” kunnen we hier dus niet met dezelfde woorden vertalen. 20) Niet alleen „kion”, want men mag niet samentrekken als de naamvallen niet gelijk zijn. 24) Ook: kiu apartenas al si.

Beoordeling:

Lupo 7; T. M. te E. 7; H. J. H. te B. 9; Astor 8; T. M. te L. 8 (jes, vi povos partopreni ĉi tiun rubrikon); A. J. G. te D. 7; F. v. d. M. te U. 6; A. R. Pzn te G. 8; P. W. te Gr. 5; A. D. te Z. 6; C. v. S. te R. 5; A. B. te A. 6; J. R. te A. 8; E. B. te A. 8; C. v. A. te Gr. 8; G. B. te Z. 6; G. A. te R. 6; Moor 6; Klopodanto 6.

Dem.: Kiel oni traduku la jenajn vortojn?

1. oplegĝer (veturilo trenata de tren-aŭtomobilo);
2. inhalen (ekz. aŭtomobilon);
3. bijhouden (ekz. aŭtomobilon);
4. vaste wastafel.

Resp.: 1. aŭtomobila kromveturilo, aŭ eble en la teksto jam sufiĉas kromveturilo;

2. veturatingi;
3. egalveturi kun, veture teni sin kun, egale postveturi;
4. fiksita (alkonstruita) lavotablo.

## OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

Nia repondo pri la teoria kaj praktika signifoj de la vorto „morta” neniel kontentigas la demandinton, k-don Suk, kiu bedaŭras, ke ni venis al tia konkludo, kiu por li signifas, „ke ni trankvile povas persisti en eraro pro tio, ke la eraro fariĝis 'praktiko', kaj ke la teorio devas cedi al la praktiko”. K-do Suk opinias, ke ni trotaksas la valoron de la praktiko, kaj per tio subtaksas la valoron de la teorio, kion li argumentas jene:

„Eĉ en naciaj lingvoj estas farataj artaj kaj naturaj ŝanĝoj. En la daŭro de la tempo oni korektas kaj plibonigas la lingvojn; vortoj kaj esprimoj perdiĝas, ŝanĝas sian signifon k.t.p.

„Se tio estas ebla ĉe naciaj lingvoj, tiom pli ĉe Esperanto. kiu estis uzata nur 60 jarojn. Ĉar krome fakte ĉiuj esperantistoj estas kaj restas iagrade lernantoj, kiuj falante kaj ekstarante devas kutimiĝi al la bona uzado de la lingvo, oni apenaŭ povas paroli pri 'la praktiko' en Esperanto. Sed plej grava estas la fakto, ke ne temas pri ŝanĝo, sed nur pri venko de eraro!

„Efektive, ĉe la naciaj lingvoj la teorio havas malmultan valoron, sed ĉe Esperanto tio estas alia, ĉar Esperanto estas la rezultato de teorumado, de logika pensado kaj rezonado. Tial la esperantistoj verkante aŭ tradukante demandas al si: Kiel en la cetera parto de la mondo oni formus tiun aŭ alian esprimon el la elementoj de la fundamento, ordigitaj laŭ la postuloj de logika pensado? Pro tio la severa admono: la Fundamenton ne tuŝu!

„Kiuj ne agas laŭ tiu ĉi principo, tiuj nepre eraras, eĉ se ili nomiĝas 'eminentuloj' kaj se ilin sekvas granda amaso da esperantistoj. La Esp.-movado ne rajtas toleri aŭ eĉ pravigi la estiĝon de tiu maniere kontraŭfundamente faritaj formoj.”

Fine k-do Suk opinias, ke ne estas tro malfrue por ekstermi estiĝintajn erarojn, ĉar ni ankoraŭ staras ĉe la komenco de Esperanto; kaj li ne partoprenas nian timon, ke la vorto „morta”, uzata en sia laŭfundamenta signifo, do kun la traduko „sterfelijk”, kaŭzus miskomprenojn. Kontraŭe, k-do Suk timas, ke, se ni „akceptus la regulon, ke eraroj, se sufiĉe ofte farataj, ne estos plu eraroj, ni per tio metus Esperanton sur deklivon kondukantan al abismo.”

Kvankam havante plenan komprenon por la vidpunkto de k-do Suk, kaj por

lia preskaŭa indigno, ke ni ne pretas defendi la teorion ĝustecon de „morta” = *sterfelijk*, sed ne *dood*, ni tamen persistas en nia jam esprimita opinio.

K-do Suk malatentis kelkajn gravajn faktorojn:

Unue, ke la redakcio de L.P., kiom ajn grandan influon ĝi ĉiam havis en la instruado de Esperanto, tamen ne reprezentas decidan aŭtoritaton. Eĉ la Lingva Komitato neniam arogis al si la rajton lingve gvidi la esperantistaron; ĝi nur kontrolis, registris, konsilis kaj rekomendis. Ni jam kelkfoje malaprobis, ke gramatikistoj decide trudas al ni teoriojn, kiujn *ankaŭ ili* opinias nepre ĝustaj, sed kiujn *ni* ne deziras akcepti (ekz. pri la modo post „kvarau” pri „dum kiam” k.s.). Ĉu ni nun agu same kiel ili, dirante, ke *nur ni* pravas? Ja ne temas pri pravo aŭ malpravo, sed pri rajto!

Due, ke, kvankam ni kaj supozeble pli multaj samopiniis pri la afero „morta”, aliaj samrajte povas havi kontraŭan opinionon. Ni ne subtaksas la valoron de la teorio, sed ni konscias, ke la teorio povas ludi nur limigitan rolon en la lingvo; jen kaj jen ĝi nepre devas cedi al la praktiko. Per unu bato oni ne povas forigi multon, kion la praktiko jam enkondukis.

Kaj krome k-do Suk komprenu, ke koncerne plurajn aferojn oni havas pli ol unu teorion. Kiu pravas? Pravigi unu signifas malpravigi alian. Kaj kiu rajtas diri, ke *nur lia* teorio estas la pli ĝusta?

Trie, ankaŭ k-do Suk scias, ke ni ne hezitas defendi teorion, kiun ni opinias ĝusta, eĉ kontraŭ la pli multaj gramatikistoj. Sed tiuokaze ni defendis nur formojn pli korektajn, kvankam lasante al aliaj liberon uzi kion ili preferas. Defendo de „morta” = *sterfelijk*, tamen, havus la konsekvencon, ke ni ne povus plu konsideri la ĝisnunan koncepton „morta” = *dood* malpli korekta, sed nepre *erara*, ĉar „sterfelijk” kaj „dood” estas du apartaj ideoj, iasence eĉ kontraŭaj, ĉar iu, kiu estas „sterfelijk” nepre ankoraŭ vivas! El defendo nia rezultus, ke *niaj* studentoj vidus en „morta” la ideon „sterfelijk”, sed en la praktiko ili vidus, ke tie la vorto havas alian signifon. La sekvo estus, ke ili sentus sin trompitaj. Kaj krom tio: ne ĉiuj studentoj legas L.P. Korekti tian praktikigintan eraron povus nur aŭtoritata instanco, ne ni! Se ni klopodus tion fari, ni kaŭzus nur miskomprenojn kaj ni

## ANKORAŬ NE — NE JAM

Oni demandis al ni kial kelkaj verkistoj uzas „ne jam” kun la signifo „nog niet”.

„Nog niet” havas du signifojn. Ne gravas uzi por ambaŭ signifoj „ankoraŭ ne”, sed, se oni preferas distingi tiujn signifojn, oni rajtas tion fari.

„Ankoraŭ” signifas daŭrigon de ago aŭ stato: *Ni estas ankoraŭ hejme* (= ni daŭrigas esti hejme).

„Ankoraŭ ne” estas logike daŭrigo de io negativa: *La letero ankoraŭ ne venis* (= ni longe atendis la leteron, kaj la atendado daŭras pro ĝia neveno). *Li ankoraŭ ne laboras* (= lia neleborado daŭras).

„Jam” signifas, ke io okazas akurate, ĝustatempe aŭ pli frue ol oni konjektis: *Li jam venis* (= oni konjektis, ke li ne venis, sed montriĝis, ke li jam venis).

„Ne jam” estas la negacio de „jam”, do neas la akuratan aŭ fruan okazon de io: *Ni atendis lin je la oka horo, sed li ne jam venis*.

La diferenco inter „ankoraŭ ne” kaj „ne jam” klare montriĝas el la jenaj ekzemploj:

*Li partoprenis la ekzamenon ne sufiĉe preparinte sin; mi do ne miris, ke li ne jam sukcesis*. Se li sukcesus, mi ja dirus: *li jam sukcesis*. Do nun *li ne jam sukcesis*.

*Li partoprenis jam trifoje ekzamenon, sed ankoraŭ ne sukcesis*. Se li sukcesus, mi ne dirus: *li jam sukcesis*, sed: *li fine sukcesis*.

Komparu ankaŭ: *La letero jam venis*. *La letero ne jam venis*. Ni akcentas en ambaŭ frazoj fruecon, resp. nefruecon de la veno. *La letero ankoraŭ ne venis*. *La letero fine venis*. Nun ni akcentas ĝian longan forreŝton.

## NEOLOGISMOJ

Neologismoj ĉerpitaj el „Sep Fratoj” de Aleksis Kivi, tradukita de Vilho Setälä.

Alizarino, kolorigilo produktita el la radikoj de rubio (mEEKrap) (kraprood, alizarine-zuur)

Bombicilo (*Bombycilla garrulus*), speco de kantbirdo (zijdestaart, sneeuwvogel)

Bonasio (*Tetrao bonasia*), birdo el la familio galinacoj (hazelhoen)

Damaro, rezino de indonezia konifero *Dammara orientalis* (dammarhars)

Fenikuro (*Phoenixurus phoenixurus*), speco de kantbirdo (roodstaartje)

Ingeroj, finna gento en Ingerlando (Ingermanland) (ingerioten)

Jubili, gaje festeni

Julo, kristnaska festo konsidere sian parte antaŭkristanan devenon

Kaki, eligi ekskrementon

Karaŝo, interjekcio imitanta la rusan

*haraŝo* (goed)

Empetro (*Empetrum nigrum* (kraaiheide)

Kreko (*Crex crex*), stilzbirdo (kwartelkoning)

Krinoj, la longaj glataj haroj en ĉevalaj kolhararo kaj vosto

Kvarto, finna mezuro (0,3 litroj)

Ledumo (*Ledum palustre*) (moerasros-marijn)

Lirli, dolĉe soni, precipe de akvo en rivereto (kabbelen)

Mazuro, kurbvejna, tre rezistema betula ligno, uzata por teniloj de laboriloj

Morna, preme malgaja (bedrukt)

Nupto, edziĝa festo

Parotito, inflamo de la salivaj glandoj

Runo, popola kanto eposa

Sciuroptero (*Pteromys*), flugsciuro (vliegende eekhoorn)

Ŝpuro, postsigno de veturilo, homo, besto (spoor)

Stofo, malnova mezuro (1,3 litroj)

Uliginosa (*Vaccinium uliginosum*) (veenbosbes, stronkbes, rijsbes)

## VOOR LITERAIRE STUDIE ONMISBAAR:

DE ESPERANTO-LITERATUUR IN VOGELVLUCHT, G. P. de Bruin .... f 0.60

LE DRAAD BIJ DE STUDIE VAN DE ESPERANTO-LITERATUUR, G. J. Degenkamp f 0.45

ESPERANTO 60-JARA, G. J. Degenkamp ..... f 1.40

gecartonneerd f 1.75

farus nin ridindaj.

Ni ne partoprenas la timon de k-do Suk, ke praktiĝintaj eraroj fine kondukus Esperanton al abismo. Male, ĝuste la stabileco de la lingvo, inkluzive de ĝiaj multaj neprefektaĵoj, savis ĝin el pereco. Sed ekzistas alia danĝero, pri kiu ni jam

kelkfoje avertis: se ĉiu gramatikisto, ĵus eltrovinte, ke io aŭ alio estas la nura korekta formo, persistas nur pri la propra pravo, kaj kondamnas ĉion alian, estiĝos konfuziĝo inter la laikaj studentoj, kiuj jam ne scios, kiu el tiuj „aŭtoritatuloj” pli, plej aŭ.... tro pravas.

